

XXIII ORDINARA TEMPO – 8-an de septembro 2013

KIU EL VI NE FORLASAS ĈIUJN SIAJN POSEDAĴOJN TIU NE POVAS ESTI MIA DISĈIPLO

Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

Lk 14,25-33

Kaj grandaj homamasoj iris kun li kaj li sin turnis, kaj diris al ili: Se iu venas al mi, kaj ne malamas sian patron kaj sian patrinon, kaj sian edzinon kaj siajn infanojn kaj fratojn kaj fratinojn, kaj eĉ ankaŭ sian vivon, li ne povas esti mia disĉiplo.

Kiu ne portas sian krucon kaj ne sekvas min, tiu ne povas esti mia disĉiplo. Ĉar kiu el vi, dezirante konstrui turon, unue ne sidiĝas, por kalkuli la koston, ĉu li havas sufiĉe, por fini ĝin? Por ke, kiam li metis la fundamenton kaj ne povas ĝin fini, ĉiuj vidantoj ne komencu moki lin, dirante: Ĉi tiu homo komencis konstrui, sed ne povis fini.

Kaj kiu reĝo, ekirante, por renkonti en batalo alian reĝon, unue ne sidiĝos, por konsiliĝi, ĉu li povas kun dek mil renkonti tiun, kiu venas kontraŭ li kun dudekmil? Aŭ alie, dum la alia estas tre malproksime, li alsendas ambasadorojn kaj demandas pri paco.

Kiu do el vi ne forlasas ĉiujn siajn posedaĵojn, tiu ne povas esti mia disĉiplo.

En la evangelio de tiu ĉi dimanĉo Luko prezentas la tri radikalajn kondiĉojn kiujn Jesuo metis al tiuj, kiuj volas lin sekvi.

Kia estas la kunteksto? Jesuo estas iranta al Jerusalemo kaj estas sekvata de multaj personoj kiuj, pro iu miskomprenita senco pri la Mesio, lin sekvas pensante iri poste disdividi inter si la povon kaj la kaptaĵojn. Ili pensas ke Jesuo estas la glora mesio, la filo de Davido, kiu iras por restarigi la mortintan regnon de Izraelo, kaj ili ne komprenis ke Jesuo estas filo de Dio, tiu kiu ne iras forpreni la povon, sed doni propran vivon en Jerusalemo.

Kaj skribas la evangeliisto, evangelio laŭ Luko, ĉap. 14, versikloj 25-33, ke "grandaj homamasoj" multnombra homamaso, "iris kun li". Do Jesuo,

komprenante tiun ambiguecon, tiun amason kiu lin sekvas pro miskomprenita sento je intereso, "turniĝis kaj diris al ili ..." kaj tiu estas la unua radikala kondiĉo "*Se iu venas al mi, kaj ne amas min pli ol li amas sian patron kaj sian patrinon, kaj sian edzinon kaj siajn infanojn kaj fratojn kaj fratinojn, kaj eĉ ankaŭ sian vivon*" greke li uzas la vorton 'psyche', kiu signifas sin mem," *li ne povas esti mia disĉiplo.*"

Jesuo antaŭe, denoncante, dum la tagmanĝo kun la fariseo, la interesligojn kiuj kunigis tiun klikon, tiun sekton, kaj la ligojn, sugestitajn de la amikeco, de la parenceco, de la interesoj, do, en la grupo de Jesuo ĉio tio devas esti malligita.

Tiom malligita ke la aliĝo al Jesuo devas iri preter la familiajn ligojn kaj, aparte, estas la bildo de la edzino, ĉar en la parabolo kiun Jesuo antaŭe komunikis al la siaj, unu el la obstakloj kiun iu prezentas por iri al tiu bankedo de la regno estas "mi edziĝis kaj pro tio mi ne povas veni".

La unua radikala kondiĉo do estas ke la aliĝo al li devas superi ĉiujn familiajn ligojn, absolute la kontraŭo de tiu de la kliko, de la sekto de la fariseoj, kie ĉio estis farata pro la intereso de la grupo.

La dua radikala kondiĉo estas la akcepto de la malestimo de la socio kaj do la granda soleco. Asertas fakte Jesuo, "*Kiu ne portas sian krucon laŭvorte "kiu ne suprenlevas sian krucon" kaj ne sekvas min, tiune povas esti mia disĉiplo.*"

La duan fojon aperas la temo de la kruco, temo kiu, mi memorigas, neniam rilatas la suferon, la malgajajn momentojn kiujn la vivo neeviteble renkontigas al ni, neniam la kruco en la evangelioj havas tiun signifon, sed suprenlevi la krucon signifas akcepti la malestimon de la socio, ĉar tiuj kiuj estis kondamnitaj al tiu hontaĵo estis konsiderataj la feĉo de la socio.

Kaj, aparte, Jesuo referencas al la preciza momento en kiu la kondamnito devis mem suprenlevi la horizontalan stangon de la kruco. De tiu momento li devis iri al la ekzekutejo ĉirkaŭata de homaj spaliro por kiuj estis religia devo insulti kaj bati la kondamniton.

La dua radikala kondiĉo estas do akcepti la solecon kaj la malestimon flanke de la socio. Poste Jesuo, per du ekzemploj kiuj rilatas la turon kaj la militon, petas kalkuli proprajn fortojn, tamen, kaj tio estas grava, li ne volas malkuraĝigi tiujn, kiuj ne havas forton, sed metigi la propran forton en la agado de la Spirito.

Koni siajn proprajn limojn do, kaj ĝuste pro tio kalkuli je tiu kiu estas la potenco de Jesuo en eminenta senco, la forto de la Spirito.

Kaj la ŝoko, la fina surprizo, por tiuj kiuj lin sekvas por disdividi inter si la kaptaĵon, li deklaras: "*Kiu do el vi*" kaj je tiu ĉi punkto al tiuj kiuj atendis kiu scias kiun spiritan konsilon, kiu scias kiun asketan normon, Jesuo metas kiel kondiĉon por esti disĉiplo, la trian... "*Kiu do el vi ne forlasas ĉiujn siajn posedaĵojn, tiu ne povas esti mia disĉiplo*". La rezigno je ĉiu posedaĵo, ne meti sian sekurecon en tion kion oni havas, sed meti sian sekurecon en tion kion oni donas, ĉar Jesuo volas malantaŭ si nur personojn liberajn. Fakte la tri kondiĉoj por la postsekvado estas ĉiuj elektoj de libero kaj por la libero.

Tiu fakto de la rezigno je la posedaĵoj aparte referencas al tio kion Jesuo diris antaŭe en la paraboloj, kie inter la pretekstoj por ne partopreni en tiu bankedo estis ankaŭ tiu kiu diris "mi aĉetis iun kampon" kaj alia "mi aĉetis kvin bovoparojn".

La posedo do de la havaĵoj kiujn oni havas estas malhelpo. Bone, estas do tri la radikalaj kondiĉoj, ĉiuj sub la signo de la libero, nur tiu kiu estas komplete libera povas sekvi la Sinjoron. La aliaj? La aliaj ĉiuj hejmen.